

Heinrich von Laufenberg,
 Jen esti hejme mia vol'
tradukita de Albrecht Kronenberger

1. Jen, esti hejme mia vol'
 kaj for de l' vana mond-konsol'.

2. La hejmo estas la ĉiel',
 kaj Dion vidi mia cel'.

3. Nun ek, animo, al prepar'!
 Atendas vin la anĝelar'.

4. Tro etas eĉ la tuta mond'
 kompare al ĉiela rond'.

5. Ĉiele estos viv' sen mort',
 nur ĝoj', kaj sano sen malfort'.

6. Mil jaroj estas unu tag',
 sen pek', ĉagren' aŭ ajna plag'.

7. La Bonon super ĉia bon'
 vi serĉu ĉe la Dia tron'.

8. Alia bon': nur eta rav'.
 Ek! Hejmen do! Al via sav'!

9. Ĉu morgaŭ? Ĉu hodiaŭ jam?
 Ne gravas! Gravas nur la Am'.

10. Restados vi neniel ajn.
 Do fuĝu el ĉi trompa ŝajn'.

11. Vi pentu, amu kun fidel',
 kaj pretu iri al ĉiel'.

12. Adiaŭ mond'! Vin benu Di'.
 Ĉielen nun foriras mi.

...

Heinrich von Laufenberg,
 Ich wollt', dass ich daheime wär'

1. Ich wollt', dass ich daheime wär'
 Und aller Welte Trost entbeh'r'.

2. Ich mein, daheim im Himmelrich,
 da ich Gott schaue ewiglich.

3. Wohlauf, mein Seel, und richt dich dar,
 dort wartet dein der Engel Schar.

4. Denn alle Welt ist dir zu klein,
 du kommest denn erst wieder heim.

5. Daheim ist Leben ohne Tod
 und ganze Freude ohne Not.

6. Da sind doch tausend Jahr wie heut
 und nichts, das dich verdrießt und reut.

7. Wohlauf, mein Herz und all mein Mut,
 und such das Gut ob allem Gut.

8. Was das nicht ist, das schätz gar klein
 und sehn dich allzeit wieder heim.

9. Du hast doch hie kein Bleiben nicht,
 ob's morgen oder heut geschicht.

10. Da es denn anders nicht mag sein,
 so flieh der Welte falschen Schein.

11. Bereu dein Sünd und bessre dich,
 als wolltst du morg'n gen Himmelrich.

12. Ade, Welt, Gott gesegne dich!
 Ich fahr dahin gen Himmelrich.

...

*Traduko de la Germana poemo “Ich wollt’, dass ich daheime wär” de HEINRICH VON LAUFENBERG (*1390 – †1460-03-31) en Esperanton de ALBRECHT KRONENBERGER (*1940-01-21) en 2014-01-26.*

Arg-972-1958 (2014-03-08 14:30:43)

Tiu ĉi teksto troviĝis presita en “Dia Regno”, n-ro 1 (904) de la jaro 2014. Ĝi estas kantebla laŭ melodio el la jaro 1430. Pri la tradukinto vidu la retejon http://de.wikipedia.org/wiki/Albrecht_Kronenberger.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas HEINRICH VON LAUFENBERG (*1390 – †1460-03-31).*

Arg-972-1957 (2014-03-08 14:28:03)

Pri la verkinto vidu la vikipediejon http://de.wikipedia.org/wiki/Heinrich_von_Laufenberg.

La teksto troviĝas en la germana evangelia kantlibro, eldono por la landaj eklezioj de la germana provinco Rejnlando-Vestfalia kaj Liplando, kanto n-ro 308, n-ro 517 de la nova “Evangelia kantlibro” por la germanaj regionoj Rejnlando, Vestfalia kaj Liplando, kiu presigis en la jaro 1996. Tie estas indikita la melodio.